
# Bulgara ESPERANTISTO



10

1979



Elementa E-kurso de lernantoj en Samokov. Gvidantino Ĥr. Veceva (vd. paĝon 7)

**Redakta Komitato:**
Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĜEV, Dimitro HAĜIEV, Maria JANKOVA, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Flori NIKOLOV.

Sektretario-administranto: **Metodi Garev**

Korektis: **Rajna Konstantinova**

Sofio, p. k. 66 Tel. 31-00-29

## *ENHAVO*

* * * La antaŭkongresa konkurado — forta ilo al novaj sukcesoj . . . . . . 1
**Dimitro Ĥaĝiev.** Eksterordinara evento . 2
* * * Belartaj Konkursoj de UEA . . . 4
**Nano Kjuĉukov.** Riĉa multflanka personeco . . . . . . . . . . . . . . . . 5
* * * Internaciaj Kursoj por E-Instruistoj en Burgas . . . . . . . . . . . . . . 7
**Ĥristina Veceva.** La pasinta lernojaro de E-o en Samokov. . . . . . . . . . . 7
**G. Cvetkov, A. Genkov.** SARE en Varno 8
* * * Diplomitoj pri instrurajto . . . . 8
**Dimitro Ĥaĝiev.** Japanaj pacbatalantoj en Bulgario . . . . . . . . . . . . . . 8
**Cv. Todorov, M. Manolova. k. a.** Floras la amikeco inter la bulgaraj kaj hungaraj e-istoj . . . . . . . . . . . 9
**Dimo Trudoljubov.** Nacia Mezlernejana E-Laborbrigado . . . . . . . . . . 10
**Nikola Aleksiev.** La 64a UK de Esperanto 11
**Sijka Kravaeva.** Dua Internacia Medicina E-Konferenco . . . . . . . . . . . . 14
**Adonis G. Meana.** Letero de amikeco . . 14
**Ĥrima.** La Brunulo . . . . . . . . . . 15
* * * El la Infanasembleo . . . . . . 16
**D. Ĉerneva, D. Orozova, M. Vâlĉeva.** Ni somerumis apud Druĵevo. . . . . . . III
* * * Junpionira Festivalo en Velingrad III
**V. Oljanov, D. Denĉev.** Aŭtuno (kanto) IV
* * * Pensoj de eminentaj bulgaroj, naskitaj en oktobro . . . . . . . . . . IV
Abono al „Scienca Mondo“ ankoraŭ eblas IV

**Sur la kovrilpaĝo:**

K-do Todor Ĵivkov, prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario, inter la partoprenantoj en la Infanasembleo en Sofio.

*Foto:* P. N. Ganev

nasaj Internaciaj Kursoj por Instruistoj de Esperanto en Burgas, kv. Meden Rudnik (vd. p. 7)
*to :* Lasto Nikov



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

OKTOBRO
1979
10
JARO 48

# *LA ANTAŬKONGRESA KONKURADO — FORTA ILO AL NOVAJ SUKCESOJ*

*La nobla konkurado inter la societoj kaj la sekcioj de BEA honore al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj estas en marŝo. Malgraŭ ke la somera periodo ne estas tre favora por organiza laboro, evidentiĝis esperplenaj rezultoj. Laŭ informo de la komisiono pri la antaŭkongresa konkurado ĉe la Centra Estraro de BEA, pluraj societoj jam almilitis konsiderindajn poentojn per sia diversbranĉa aktivado. Elstaras la societo „Stojo Kalpazanov" en Velingrad per 185 poentoj (dommastro de naciskala kaj de internacia aranĝoj, akcepto de eksterlandaj gastoj, gastado eksterlande, priesperantaj disaŭdigoj per radio Plovdiv kaj la urba reto, materialoj en la loka ĵurnalo ka.). Bonajn sukcesojn atingis ankaŭ la societoj „Maksim Gorkij" — Sofio, „Progreso" — Polski Trâmbeŝ, „Vekiĝo" — Ŝumen, „Nigra Maro" — Burgas, „Radio" — Pazarĝik, „Roza Valo" — Kazanlâk, „Balkana Stelo" — Trojan, la Junulara grupo ĉe E-societo „Espero" — Vidin, ka. Postrestas la asociaj sekcioj.*

*La kondiĉoj kaj la indicoj de la antaŭkongresa konkurado estas jam bone konataj al ĉiu societa, distrikta kaj sekcia estraroj kaj al la membraro pere de la detala informmaterialo, dissendita jam en junio. Konsiderante la specifikaĵojn de la asociaj societoj oni dividis ilin en kvar grupojn, enkadre de kiuj la societoj konkuros ĉe relative egalaj kondiĉoj. Por ĉiu grupo estas disponigitaj po tri premioj tutegalaj.*

*La indicoj estas 8 kaj emfazas ĉiujn agadkampojn de BEA: membraro, E-kursoj, abono al E-gazetoj, publikaj manifestaĵoj, solenaĵoj, ekspozicioj, publikaĵoj en la bulgara gazetaro kaj kunlaboro al E-periodaĵoj, internacia korespondado, ligo kun interfratiĝintaj urboj, akcepto de gastoj el eksterlando, gastado alilande, kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj, partopreno en laborbrigadoj, E-o en la profesio ktp. Do kampo por ĉiu inklino, por ĉiu kapablo. Ĉiu membro streĉu la fortojn por persona kontribuo kaj por prestiĝa loko de sia societo aŭ sekcio en la konkurada gradigo.*

*Por daŭraj kaj altnivelaj rezultoj en la konkurado tre gravas la organizado. Necesas, ke la societaj kaj sekciaj estraroj planu kaj zorge organizu la iniciatojn lige kun la konkurado, donu taskojn al ĉiu membro. Gravas ankaŭ la aktuala kaj detala informado pri la atingoj. Modele agas tiurilate la estraro de la tuturba E-societo „M. Gorkij" en Sofio. Ĝi dediĉis specialan kunvenon al la konkurado, nomis respondeculojn por ĉiu branĉo de agado, proponis al ĉiu membro skribe fiksi sian propran kontribuon farotan, dum la semajnaj kunvenoj informas la membrojn pri la rezultoj.*

*La konkurado ne inkluzivas la distriktajn estrarojn de BEA. Tio tamen tute ne signifas, ke ili povas flankestari. Male: ĝuste ili devas de proksime gvidla konkuradon, strebi insiste por pli prestiĝa loko de la societoj sur sia terita*

*rio. Kiel ekzemplo ni denove devas montri Sofion. La Sofia Distrikta-Urba Estraro de BEA tre profunde diskutas la iniciatojn lige kun la konkurado, helpas la societojn, havas aktualan rigardon pri la marŝo de la konkurado en la ĉefurbo kaj en la distrikto.*

*Vekas maltrankvilon la stato de la konkurado inter la sekcioj. Ĝis nun la Instruista Sekcio plej aktivas kaj atingis konsiderindajn sukcesojn. Mute silentas tiaj gravaj asociaj sekcioj kiel fervojista, poŝtista, sciencista, literatura ktp. En la kadroj de la 40a jubilea kongreso en Plovdiv ili pridiskutos sian agadon — kion iliaj estraroj raportos? Ankoraŭ ne estas malfrue doni puŝon al la diversflanka sekcia laboro, aparte al la streboj, ke E-o eniru la profesiojn, la praktikon.*

*Ni energie streĉu la fortojn! Per la antaŭkongresa konkurado — al novaj, ĉiam pli grandaj sukcesoj! Ni bone lernu de tiu konkurado por sukcese apliki ĝian metodon en nia laboro ankaŭ dum la jaroj post la kongreso!*

---

# EKSTERORDINARA EVENTO



Per tiuj ĉi du vortoj la ĝenerala direktoro de UNESKO s-ro Amadou Mahtar M'Bow (Amadu Mahtar M'Bou) tute trafe karakterizis la okazintan en Sofio de la 15 ĝis 25 de aŭgusto 1979 Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco".

La Asembleo estis organizita laŭ iniciato de Popola Respubliko Bulgario enkadre de la Internacia Jaro de la Infano (IJI) sub la aŭspicioj de k-do Todor Ĵivkov — la unua sekretario de la Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario, kaj s-ro M'Bow — la ĝenerala direktoro de UNESKO. La bulgaraj infanoj en sia letero komence de la kuranta jaro invitis la infanojn el ĉiuj landoj de la mondo al renkontiĝo de estontaj pentristoj, muzikistoj kaj verkistoj. Siaflanke la bulgaraj agantoj en la sfero de la scienco, edukado kaj arto adresis leteron al siaj kolegoj en la tuta mondo, invitante ilin subteni la iniciaton kaj per siaj kompetentaj konsiloj kaj agoj helpi la infanojn en siaj landoj prepari sin por la renkontiĝo en Sofio.

Tiu ĉi iniciato, aprezita kiel unu el la plej grandaj manifestaĵoj dum IJI, estis plia demonstrado de la politiko de la Bulgara Komunista Partio kaj de la bulgara registaro, direktita al firmigo de la spirito de paco kaj paca kunekzistado, de komprenigo kaj kunlaboro inter la popoloj. La Asembleo estis tre trafe nomita „Standardo de la Paco", ĉar kie ajn estas infanoj, ila havas plej bonan amikon — la pacon. Li flugilhava devizo de la Asembleo „Unueco, kreado, beleco" — havas profundan signifon. La signalvorto de la Asembleo kaj ĝia devizo fariĝis potenca forto, kiu emociis milojn da homoj sur la tero — junajn kaj plenkreskajn. La natura kaj afabla akcepto, kiun la Asembleo trovis ĉie en la mondo ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi respondas al la intimaj ardaj deziroj kaj streboj de la infanoj kaj de tiuj, kiuj amas ilin. Tamen la Asembleo estis adresita ne nur al la infanoj, sed al ĉiuj homoj de la mondo. Ĝia fundamenta celo estis direkti la atenton de la monda publiko al la rolo kaj signifo de la kulturo por la evoluo de la socio. Kaj tiu ĉi celo estis atingita.

La Asembleo montriĝis kiel unika laŭ sia speco internacia renkontiĝo. Ĝi transformiĝis en universalan festivalon de la infana kreado. Dum dek tagoj la ĉefurbo de Bulgario, portanta la nomon de la saĝeco, kaj la tuta lando estis gastigantoj de la paco kaj amikeco inter la popoloj, de ties estonteco — la infanoj. Dum tiuj ĉi tagoj Bulgario fariĝis, laŭ la kvalifiko de la raportisto de la franca ĵ. „Le Monde", internacia respubliko de la infanoj. En Sofion venis 1037 infanoj el 76 landoj de ĉiuj kontinentoj de la mondo kaj pli ol 200 iliaj gvidantoj — instruistoj, pedagogoj, ĉefoj de edukaj kaj kulturaj institutoj. Preskaŭ la sama nombro de infanoj ĉeestis el ĉiuj partoj de Bulgario, elektitaj per konkursoj. Krom tio en la Asembleo partoprenis foreste infanoj el aliaj 7 landoj per sendo de siaj pentraĵoj, literaturaj verkoj kaj komponaĵoj.

Pri la signifo de la evento atestas la fakto, ke en la Iniciatan Komitaton de la Asembleo, prezidatan de la prezidantino de Ko

mitato pri Kulturo de Popola Respuliko Bulgario k-dino Ljudmila Ĵivkova, eniris eminentuloj kiel prof. Ifra Neaman el Anglio, s-rino Estefania Aldaba-Lim el Filipinoj, speciala reprezentantino de UNO por la Internacia Jaro de la Infano, la itala infana verkisto Gani Rodari, la kuba pentristo Karmelo Gonzales, Erhabor Emokpal, skulptisto el Nigerio, Pierre Gamara, beletristo, literatura kritikisto, ĉefredaktoro de revuo „L'Europe" el Francio, Sergej Miĥalkov, soveta verkisto, Heroo de la Socialisma Laboro, laŭreato de Lenin-Premio, kaj Hervé Bazin, franca verkisto, prezidanto de la Akademio „Goncourt". Gastoj de la Asembleo estis 42 verkistoj, poetoj, pedagogoj, estroj de kulturaj establaĵoj, ĵurnalistoj, gvidantoj de internaciaj sociaj kaj kulturaj organizaĵoj. En la gazetara centro de la Asembleo estis akredititaj 74 ĵurnalistoj el 22 landoj. Mesaĝoj venis el 26 ŝtatoj. Inter la mesaĝoj estis tiuj de 13 ŝtatestroj, de la ĝenerala sekretario de UNO s-ro Valdhajm, de Papo Johano-Paŭlo la II.

Por la Asembleo venis entute 17 114 infanaj verkoj (pentraĵoj, literaturaĵoj, komponaĵoj) de 12 905 aŭtoroj el 75 landoj inkluzive Bulgarion. Nature, la plej granda estis la nombro de la verkoj de bulgaraj infanoj (10 553 de 7972 aŭtoroj). Plej multaj estis la pentraĵoj. Tiumaniere nun Bulgario estas la lando, kiu posedas la plej grandan kolekton de infanaj verkoj. Tiuj ĉi verkoj kaj la diversaj artaj manifestaĵoj dum la tagoj de la Asembleo denove pruvis la pravecon de la vortoj de Georgi Dimitrov — la granda filo de la bulgara popolo, fidela amiko de la infanoj el la tuta mondo, ke sur la kampo de la kulturo ne estas grandaj kaj malgrandaj popoloj. La Asembleo montris, ke ĉie la infanoj estas la samaj.

Multaj estis la emociaj momentoj de tiu ĉi eksterordinara renkontiĝo, de tiu ĉi neforgesebla festo.

Ĝi komenciĝis per solena inaŭguro en la plej granda halo „Universiado" en Sofio, kiun ĉeestis ankaŭ la alta protektanto de la Asembleo k-do Todor Ĵivkov. Inspiran paroladon faris la prezidantino de la Iniciata kaj Organiza Komitato de la Asembleo k-dino Ljudmila Ĵivkova, kiu finiĝis per la alvoko: „Donu manojn unuj al aliaj kaj en la fundamento de la kreado skribu unuecon, belecon, harmonion". Estis voĉlegita mesaĝo de k-do Todor Ĵivkov, per kiu li bonvenigis la junajn amikojn.

Dum la tagoj de la Asembleo okazis revuo de la infana literatura verkaro, recitaloj kaj koncertoj de la junaj verkistoj, pentrado sur la asfalto antaŭ la Nacia Biblioteko „Kiril i Metodij", emociaj renkontiĝoj kun elstaraj bulgaraj kaj eksterlandaj komponistoj, muzikistoj, verkistoj kaj pentristoj. En la salonegoj de la kvinetaĝa Arta Galerio en Sofio estis aranĝita ekspozicio de infanpentraĵoj entute 6025 (1075 el Bulgario kaj 4950 el eksterlando) kaj verkoj de la aplika arto. Estis aranĝita ankaŭ ekspozicio de fotoj, faritaj de infanoj. La pentraĵoj kaj la fotoj restas en Bulgario kiel dokumentoj pri la nivelo de la spirita disvolviĝo de la nuntempa generacio. Notindas, ke la pentraĵoj de la infanoj el ĉiuj anguloj de la mondo estas optimismaj, malgraŭ ke la temoj ofte estas tragikaj. Treege amuza estas la gaja infana karnavalo kaj la revuo de la infanaj fabeloj en la Palaco de la Junpioniroj. La lastan tagon de la Asembleo estis inaŭgurita mozaika panelo en la parko „Vladimir Zaimov".

La programo de la Asembleo inkludis ekskursojn: al Plovdiv, Karlovo, Kalofer, Sopot, Rodopi-montaro, Rila-monaĥejo, Veliko Târnovo kaj al la bordo de Nigra Maro. Tie sur la plaĝo la infanoj kun vervo skulptadis figurojn el sablo.

Dum la tagoj de la Asembleo rondveturis tra Bulgario Kantanta Vagonaro „Standardo de la Paco", kies veturantoj estis junaj bulgaraj muziktalentuloj — infanoj de fervojistoj. En Sofio ĉiuj infanoj, partoprenantaj la Asembleon, uzis senpage la servojn de la urba publika transporto. Funkciis ankaŭ speciala „infana tramo", la tuta bele ornamita, kun pentritaj scenoj el ŝatataj infanfabeloj. Tiun tramon rajtis uzi nur infanoj — solaj aŭ kun gepatroj, kompreneble, senpage.

La Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco" estis eternigita ankaŭ per emisio de speciala poŝtmarko fare de la Ministerio de Komunikoj de PRB. Kiel ĝia temo estis reproduktaĵo de la mozaiko „La infanoj de la planedo", verko de infana kolektivo.

Ekde junio ĝis la fino de aŭgusto la Organiza Komitato de la Asembleo eldonis kvin numerojn de speciala gazeto „Standardo de la Paco", en kiu estis publikitaj literaturaĵoj, komponaĵoj kaj pentraĵoj de infanoj

**AŬGUSTO 79 EN SOFIO**

Desegnis **K. Dragostinov**



el la tuta mondo. Estis eldonitaj du luksaj libroj: unu kun versaĵoj kaj pentraĵoj de bulgaraj infanoj sub titolo „La suno kaj mi" kaj alia kun pentraĵoj de eksterlandaj infanoj partoprenantaj la Asembleon.

Eksterordinare interesa kaj samtempe eduka programero estis la vizito de la junaj asembleanoj en la parlamentejo de PRB. Por la unua fojo en sia historio la parlamentejo akceptis la plej gravajn parlamentanojn sur la tero — la infanojn de la mondo. Ili venis ĉi tien por levi voĉon je la nomo de la paco kaj amikeco, je la nomo de la estonteco kaj la feliĉa infaneco. Por la unua fojo en la historio de la homaro kunsidis monda infana parlamento, elektita laŭ la leĝoj de paco kaj amikeco fare de la infanoj-partoprenantoj en la Internacia Jaro de la Infano. La „junaj parlamentanoj" akceptis Leteron-Alvokon al la infanoj de la tuta mondo kaj pere de UNO al la tuta homaro.

Tamen la plej emocia kaj impona momento, kiu eterne restos en la memoro de ĉiuj infanoj, certe estis la solena inaŭguro de la Monumento „Standardo de la Paco", konstruita apud Sofio, en la piedoj de monto Vitoŝa. Tiu ĉi evento estis la fina akto de la Asembleo. La monumento estas 37 metrojn alta turo kun sep sonorilegoj de 120 ĝis 750 kg, simbolantaj la sep kontinentojn de nia planedo. Ili reproduktas la himnon de la Asembleo, verkitan de la bulgara komponisto Aleksandro Josifov. Ĉirkaŭ la piedestalo de la sonorilturo estas instalitaj ankoraŭ 54 sonoriloj de diversaj dimensioj, senditaj kiel donacoj el la landoj partoprenantaj la Asembleon. Iuj el ili estas faritaj de malnovaj majstroj de la 18 jc, aliaj estas faritaj speciale por la Asembleo. La infanoj de ĵus liberigita Nikaragvo alveturigis sonorilegon de la unua liberigita urbo Leon, kie estis proklamita la ribelo. La japana sonorilego, 375 kg, estas la plej peza japana sonorilego ekster Japanio. La bulgara sonorilego pezas 1300 kg. Ĝi simbolas 1300 jarojn ekde la fondo de la bulgara ŝtato.

En sia malferma parolado la ĝenerala direktoro de UNESKO s-ro M'Bow diris: „Tiu ĉi monumento estas esprimo de kredo. Ĉiuj, kiuj venas ĉi tien, volu pensi pri vi— la junularo de la mondo, pri via estonteco, kiu povas esti sekurita nur en progreso, paco kaj kompreniĝo inter ĉiuj popoloj."

Post kelkaj aliaj eroj de la inaŭgura ceremonio venis la plej majesta momento: eksonis la sonoriloj de nova, nekonata ĝis nun simfonio, simfonio de la pura infana amikeco kaj unueco, simfonio de la paco. Sublima momento, kiam centoj da koroj batas en unu ritmo kaj el ili elverŝiĝas unu sama sento radianta el miloj da okuloj — la sento de la internacia frateco.

Je la fino de la Asembleo la plej altranga gvidanto de PR Bulgario, k-do Todor Ĵivkov, donis en la registara rezidejo „Bojana" bankedon al ĉiuj asembleanoj. Li adiaŭis kun siaj novaj junaj geamikoj per kortuŝaj paroloj.

Finiĝis rapide la dek tagoj de la Infanasembleo, dek neforgeseblaj tagoj en la internacia infana respubliko de la ĝojo kaj amikeco. Dum tiuj tagoj naskiĝis novaj konatiĝoj, ekfloris persona amikeco inter centoj da puraj koroj, plikreskis kaj fortiĝis la internacia sento de amikeco, reciproka estimo kaj kunlaboro inter homoj kaj popoloj, de preteco kaj entuziasmo labori kaj batali por nova mondo sen ŝovinismo, rasismo kaj militoj.

Lige kun la Infanasembleo „Standardo de la Paco", en Sofio de la 23 — 30 de aŭgusto okazis internacia simpozio „La infano — la kredo kaj la evoluo", kiun partoprenis 76 sciencistoj, specialistoj kaj pedagogoj el 24 landoj. Okazis ankaŭ malfermo de fotoekspozicio pri la atombombadoj de Hiroŝimo kaj Nagasako, kiu estis akompanita de 35-membra delegitaro de la Japana Pacdefenda Komitato.

La bulgara popolo, kiu donis al la sendintoj de la morgaŭo sian amon kaj gastamon kaj gajnis multajn novajn amikojn, bondeziras al ĉiuj sanon kaj feliĉon. Ĝi invitas ilin denove, post tri jaroj, al la Dua Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco", kiu krom la arta inkluzivos ankaŭ la sciencan infanverkaron. La ideo de Bulgario daŭrigi periodan okazigon de tiaspeca infana forumo estas alte aprezita en multaj landoj. Ankaŭ per tio nia popolo donas sian kontribuon por triumfo de la spirito de kompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj, de paco kaj amikeco en la mondo.

**Dimitro Ĥaĝiev**

## *BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA*

*Konkursis entute 176 verkoj (poezio 48, prozo 23, teatraĵoj 5, eseoj 8, porinfana literaturo 39, fotografio 53) Inter la premiitoj estas ankaŭ du bulgarinoj.*

*En la branĉo „Porinfana literaturo" IIIan premion gajnis s-anino NEVENA NEDELĈEVA el Sofio por la rakonto „Du leteroj".*

*En la branĉo „Nova talento" (Pokalo Harabaĝiu) estis premiita s-anino RAJNA KONSTANTINOVA el Sofio por la verko „Promeno en la infanecon".*

*Ni gratulas niajn samideaninojn!*

*Lige kun la 70-jariĝo de k-do Nikola Aleksiev*

*Nano Kjuĉukov*

# RIĈA MULTFLANKA PERSONECO

Li atingis la supron de sia 70-jariĝo honorita per la alta titolo „Heroo de la Socialisma Laboro". Tio estas popola rekono de lia abnegacia partopreno en la batalo kontraŭ monarkofaŝismo kaj pro lia kontribuo al la konstruado de nova, socialisma vivo en nia lando.



Naskita en la subbalkana urbeto Berkovica en la familio de ŝuisto, Nikola Aleksiev jam 10-jara, partoprenante en la infanaj komunistaj grupoj, aliĝas per sia tuta koro al la progresemaj ideoj. La revolucia ondo de 1923 j. donas flugilojn al lia kredo je la historia misio de la laborista klaso kaj ĝia komunista avangardo. En la vicoj de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS) kaj la Bulgara Komuna Popola Studenta Unuiĝo (BONSS) li kreskas kaj hardiĝas kiel batalanto-revoluciulo, kiu aktive partoprenas en protestaj manifestaĵoj, demonstracioj kaj strikoj. Li estas senlaca funkciulo de la Bulgara Komunista Partio, okupante ankaŭ la postenon de sekretario de ĝia distrikta komitato. La konstantaj persekutoj kaj devigaj loĝigoj en lian naskiĝregionon kaj la humidaj ĉeloj de kvin malliberejoj ne rompas lian volon al batalo.

La nomo de Nikola Aleksiev estas nedisigeble ligita kun la historio de la sindikata movado en nia lando. Enirinte ĝiajn vicojn jam en la tempo de la Sendependaj Laboristaj Sindikatoj (kiel kasisto-librotenisto de la Centra Estraro), ĉe la popola regpotenco li estas membro kaj sekretario de la Centra Konsilio de la Bulgaraj Sindikatoj. Notindan aktivecon li disvolvas ankaŭ kiel kandidat-membro de la Ĝenerala Konsilio de la Monda Federacio de Sindikatoj. Nikola Aleksiev estas merita aganto de la bulgara sindikata gazetaro. Li estis redaktoro de ĵ. „Edinstvo" (Unueco), post la Naŭseptembra Revolucio de 1944 j. — fondinto kaj redaktoro de la semajna ĵurnalo „Zname na Truda" (Standardo de la Laboro) kaj ĉefredaktoro de ĵ. „Trud" (Laboro). Kiel gvidanto de fako „Gazetaro" ĉe la Centra Konsilio de la Bulgaraj Sindikatoj li senpere gvidas la sindikatajn eldonaĵojn. Lia krea biografio ampleksas multajn broŝurojn, skizojn kaj radioprelegojn, parto de kiuj eniris la libron „En la vicoj de la klaso". La forta publicista plumo de tiu elokventulo estas ekzemplo por la junaj amikoj de la ĵurnalistiko pro sia simpla, klara kaj emocia stilo, pro sia pura kaj preciza bulgara lingvo.

Nikola Aleksiev posedas la plej valoran homan virton — la komunistan humanecon kun karakteriza por li boneco kaj kuraĝeco. Lia scipovo unuigi la homojn, lia forta socia sento faras lin bonega sociaganto, por kiu tiu ĉi agado estas vera destino. Eble tio estas la ĉefa kaŭzo, ke oni konstante

lin elektas en la gvidorganoj de multaj amas-organizoj. Kun komunista pasio kaj entuziasmo li laboras kaj en la Bulgaraj Sindikatoj, kaj en la Patrolanda Fronto, kaj en la movado de bulgara-soveta amikeco, kaj inter la sobruloj, kaj inter la propagandantoj de la bulgara kulturo en eksterlando, kaj inter la batalantoj por paco kaj sekureco en la mondo.

Nikola Aleksiev estas granda figuro en la bulgara kaj internacia E-movadoj. Dum la 30-aj jaroj li dediĉis multan energion al la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA) kiel sekretario de ĝia Centra Komitato. Li redaktas la E-gazeton „Balkana Laboristo“ kaj la bulgarlingvajn ĵurnalojn „Meĵdunaroden Ezik“ (Internacia Lingvo) kaj „Meĵdunaroden Rabselkor“ (Internacia Laborista-Kamparana Korespondanto). Sub lia prezidanteco la Bulgara Esperantista Asocio, kiu estis dommastro de du Universalaj Kongresoj de Esperanto, akiris altan internacian aŭtoritaton. Aleksiev estas ankaŭ tradukisto en Esperanton — sub preso estas la tradukita de li libro de Mersia Makdermot „La apostolo de la libero“. Multjare Aleksiev estis ankaŭ prezidanto de la Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kaj nun ĝia honora prezidanto. Li estas membro de la gvida komitato de Universala E-Asocio (UEA). Rekono de lia kontribuo sur tiu kampo estas lia konorigo per la ordeno de la Kulturligo de GDR „Johannes Becher“ pro lia kultura agado.

Tiu rara homo, dotita per riĉa spirito, havas ĉiam bonan humoron, kiu ne povas ne krei sinceran atmosferon ĉirkaŭ li. Ĉiam modesta, li neniam, paradas pri sia riĉa sperto kaj pri siaj konoj. Samtempe li posedas noblan senton de humuro. Mi observis, kiel Aleksiev gvidas kunsidojn: li motivite klarigas la demandojn, atentas la opiniojn de la aliaj, taksas bone la junulojn, ĉe disputaj demandoj facile trovas la vojon al plej korekta decido, ĝeneraligas ĝuste kaj trafe.

Mi ne eraros dirante, ke Nikola Aleksiev estas modelo de harmonie disvolviĝinta personeco, enkorpiĝo de ĉio plej bona, kreita en la sino de la bulgara popolo.

## *CELEBRO DE NIKOLA ALEKSIEV*

La 25an de septembro la sofiaj e-istoj solene celebris la 70-jaran jubileon de k-do N. Aleksiev en la Domo de la Tekniko. La solenaĵon malfermis kaj gvidis k-do Ĥristo Gorov — la prezidanto de BEA.

Gratulleteron al Aleksiev de k-do T. Ĵivkov tralegis k-do Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de BEA. Poste li trafe kaj verve parolis pri la multflanka agado kaj riĉa vivo de Aleksiev. Lia altnivela parolado estis multfoje aplaŭdita de la emociita publiko.

Sekvis gratuloj al la merita altestimata jubileulo. La kulturataŝeo de GDR en Sofio k-dino Vera Lickendorf gratulis en la nomo de la ambasadoro de GDR kaj enmanigis al k-do Aleksiev la ordenon „Johannes Becher“ (ora), per kiu la Kulturligo de GDR honoris lin.

Specialan gratuladreson en la nomo de CE de BEA tralegis kaj enmanigis la sekretario de BEA k-do Kunĉo Vâlev. Gratulojn prezentis ankaŭ: prof. inĝ. Vasil Peevski — en la nomo de la e-istoj-sciencistoj, Ĥristo Kanev — prezidanto de DE de BEA en Sofio, Belka Beleva — prezidantino de la Sofia E-societo „M. Gorkij“, Dimitro Gaĉiev — prezidanto de la bulgara sekcio de MEM, Jordan Jordanov — prezidanto de la DE de BEA en Smoljan, Veska Nakova — prezidantino de la Poŝtista E-societo „Heroldo“ en Sofio, Draguŝko Petrov — prezidanto de IPTEA, la Heroo de la Socialisma Laboro Vasil Bozarov — prezidanto de la Instruista Sekcio de BEA, Dimitrina Tonĉeva — en la nomo de DE de BEA en Blagoevgrad, Bojĉo Mladenov — en la nomo de DE de BEA en Vraca, Gunka Saratlijska — en la nomo de la Sofia Fervojista E-Societo ka. Oni anoncis, ke estas ricevitaj dekoj da gratulleteroj de socipolitikaj kaj kulturaj organizaĵoj kaj apartaj personoj el la lando kaj eksterlando. Sur la tablo antaŭ la jubileulo formiĝis impona amaso de florbukedoj kaj memordonacoj, kiujn la gratulantoj enmanigis al li.

Al ĉiuj gratuloj k-do Aleksiev respondis per varmaj, kortuŝaj vortoj, promesante labori kaj batali ĝis la lasta spiro por Esperanto, por socialismo, por internacia amikeco kaj paco en la mondo.

## *Salutoj al k-do N. Aleksiev*

*Al k-do NIKOLA ALEKSIEV*
*str. Nezabravka 1/II, Sofio*

*Kamarado Aleksiev,*

*Plej sincere mi salutas vin okaze de via 70-jariĝo kaj la honorigo per la alta titolo „Heroo de la Socialisma Laboro" pro via aktiva partopreno en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj en la konstruado de socialismo.*

*El tuta koro mi deziras al vi bonan sanon kaj aktivan multjareson.*

*30 de julio 1979*

*(s) Todor Ĵivkov*

*

*Tre kara kaj altestimata kamarado Aleksiev,*

*La Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio gratulas Vin pro Via glora 70-jara jubileo kaj pro la alta distingo, farita al Vi de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario — Heroo de la Socialisma Laboro.*

*Tiun ĉi honorigon Vi ricevas kiel multjara sindona kaj aktiva sociaganto, batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, membro de Monda Packonsilio, prezidinto dum 15 jaroj de BEA kaj de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kies honora prezidanto Vi nun estas, kiel prezidinto de du Universalaj Kongresoj de Esperanto, okazintaj en nia lando.*

*Samtempe ni gratulas Vin pro Via kvindekjara agado en la landa kaj internacia Esperanto-movadoj. Depost 1928 j. Vi laboris en BuLEA, redaktis dum la faŝista reĝimo kelkajn esperantajn revuojn. Post liberiĝo de nia lando elsub faŝista jugo Vi plue laboris kiel redaktoro kaj nun ankaŭ laboras sur la ideologia kampo.*

*Ni fieras pri Vi kiel elstara figuro en la bulgara kaj monda Esperanta kaj paca movadoj!*

*Ni tutkore deziras al Vi firman sanon, neelĉerpeblan energion kaj longanr vivon, por daŭrigi kiel ĝis nun Vian sindonan agadon por Esperanto kaj po la paco!*

*SEKRETARIO: K. Vâlev* *PREZIDANTO: Ĥr. Gorov*

## ORGANIZA VIVO

### INTERNACIAJ KURSOJ POR E-INSTRUISTOJ

De la 6 ĝis la 25 de aŭgusto en Burgas, kv. Meden Rudnik, por la deka fojo okazis Internaciaj Kursoj por E-Instruistoj. Partoprenis ĉ. 190 personoj el Bulgario, Pollando, ĈSSR, Hungario, Rumanio, Sovetunio, GDR, Jugoslavio, Avganistano.

Formiĝis 8 klasoj: 3 klasoj de la I grado sub la gvido de Georgi Dimov, Penka Bujuklieva, Eva Bojaĝieva; 2 klasoj de la II grado sub la gvido de Neno Janev kaj Ivan Liŝev; 2 klasoj de la III grado, gvidataj de Violin Oljanov kaj Nikolaj Bojaĝiev; 1 metodika klaso por diplomiĝo pri instrurajto sub la gvido de la Hungaro Zsolt Gyarmathy (Ĵolt Gjarmati) kaj Kunĉo Vâlev.

Ĉiutage estis 4 studhoroj antaŭtagmeze. Posttagmeze — plaĝo, banado en la maro, ekskursoj. Vespere — amuzoj, programoj, promenadoj, projekciado de diapozitivoj ka.

Fine de la kursoj okazis ekzamenoj. Sukcese faris ilin por la I grado 37 personoj, por la II grado — 49, por la III — 17. En la metodika grupo ŝtatan diplomon ricevis 16 novaj plenrajtaj E-instruistoj.

### *La pasinta lernojaro de E-o en Samokov*

En Samokov dum 1978/79 lernojaro funkciis 3 E-kursoj por komencantoj.

Unu el ili estis gvidata de Ĥristina Veceva (gelernantoj el la IV klaso, lernejo „Ĥristo Maksimov"). Atestojn por la I grado ricevis 11.

Dua kurso okazis en lernejo „Boris Haĝisotirov" (lernantoj de VII klaso). Ĝin gvidis la instruistino Bateva.

Kurson por 14 civitanoj gvidis Vasil Trifonov.

Ĉe E-societo „Rila Esperantisto" en Samokov estis fondita junulara E-grupo kun respondeculo inĝ. Ljuben Djulgerov.

**Ĥristina Veceva**

## *SARE EN VARNO*

La 14an de julio en Varno okazis la unua Somera Amika Renkontiĝo Esperantista (SARE), dediĉita al la 35a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario. Ĝin partoprenis (e-istoj el Norda Bulgario.

La solena inaŭguro okazis en salono de Domo de la Popola Floto. Prelegon je temo „35 jarojn popola regpotenco" faris Lili Andreeva el Varno.

En la literatura-muzika programo partoprenis la amatoroj J. Markova, V. Angelova, St. Stojkov, N. Doĉeva kaj A. Kujumĝieva el Varno, kiuj prezentis recitalon „Vivo por la partio" kun arta gvidanto leŭtenanto Boĵidar Slavov. La ĥoro „Kamĉijska Lilija" kun gvidanto Milko Dimitrov prezentis riĉan muzikprogramon.

Aparte bone prezentiĝis la 32-persona grupo el Ruse. La amatora teatra trupo de la tiea E-societo „Libero" prezentis la komedieton „La gastino" de la skota verkistino S. Sly. Tre bone ludis N. Sirkova, S. Ruseva, P. Petrova, G. Dobrev, Kr. Buĉukliev, G. Venkov.

Komuna vespermanĝo por ĉiuj okazis en apudmara restoracio.

La sekvan tagon okazis ekskurso al la famaj ripozlokoj „Druĵba" (Amikeco) „Zlatni Pjasaci" (Ora Sablaro) kaj „Galata".

**G. Cvetkov, A. Genkov**

## DIPLOMITOJ PRI INSTRURAJTO

En la Internaciaj Kursoj por E-Instruistoj en Burgas, kv. Meden Rudnik, ĉi-jare diplomiĝis:

1. **Maria Pejkova** — V. Târnovo
2. **Steliana Kavrâkova** — Trojan
3. **Valerija Cvetkova** — Leningrad
4. **Georgi Dimov** — Jambol
5. **D-ro Zdravka Popova** — Nova Zagora
6. **Neli Cankova** — v. Enina — Stara Zagora
7. **Nadejda Geneva** — Gabrovo
8. **Maria Ĥristova** — Ĥaskovo
9. **Vasil Dâbov** — Plovdiv
10. **Petko Totev** — Gabrovo
11. **Elena Stojkova** — Burgas
12. **Dimitrina Tonĉeva** — Blagoevgrad
13. **Tonka Vardalieva** — Pomorie
14. **Lasto Nikov** — Sofio
15. **Rumen Popov** — V. Târnovo
16. **Maria Belĉeva** — Ruse

Ni gratulas la novajn diplomitojn kaj bondeziras al ili esti ĉiam entuziasmaj kaj sindonaj semantoj sur la nobla E-kampo.

## *JAPANAJ PACBATALANTOJ EN BULGARIO*

En aŭgusto 1979, enkadre de la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco", en nia lando gastis 35-membra japana pacdefenda delegitaro por informado de la mondo pri la bombadoj de Hiroŝimo kaj Nagasako. Kunlabore kun la Komitato pri Kulturo de PR Bulgario kaj la Bulgara Nacia Pacdefenda Komitato la delegitaro aranĝis en la Domo de la Unuiĝo de Batalintoj kontraŭ la Faŝismo kaj Kapitalismo en Sofio ekspozicion pri la hororoj de la atombombadoj.

La ekspozicio konsistis el fotoj kaj pentraĵoj, faritaj de supervivintoj de la tragedio. Post la oficiala inaŭguro, pri la atombombado de Hiroŝimo parolis s-ro Tagaŭa, unu el la restintaj vivaj, kiu perdis sian patrinon, sian fraton kaj ĉiujn kuzojn.

*Ej la ekspozicio de la pacbatalanntoj el Japanio*



Hiroŝimo kaj Nagasako devas esti ripetitaj neniam kaj nenie en la mondo!" — tio ĉi estis la alvoko de la ekspozicio, adresita al ĉiuj homoj en la mondo.

Inter la membroj de la delegitaro estis la pacamikoj e-istoj Kimiaki Kurita, prezidando de la Japana Pacdefenda E-Asocio (la japana sekcio de MEM) kaj ĉefredaktor de ties organo „La Verda Kolombo", kaj Ikuo Senga, aktivulo de la Japana Pacdefenda Komitato.

Por la du pacamikoj e-istoj estis farita ĉio ebla por bone ĝui kaj utiligi sian restadon en Sofio. Ili vizitis lernejojn, infanĝardenojn, ekspoziciojn de infanpentraĵoj, partoprenis ekskurson al monto Vitoŝa. S-ro Kurita havis intervjuon kun raportisto de radiostacio „Horizonto". Intervjuon li donis ankaŭ al revuo „Zaŝtita na Mira" (Defendo de la Paco), organo de la Bulgara Nacia Pacdefenda Komitato, kaj por la organo de MEM „Paco".

En la oficejo de Bulgara E-Asocio okazis amika renkontiĝo de la gastoj kun la prezidanto de BEA k-do Ĥristo Gorov kaj membroj de la Bulgara MEM-Komitato. Krom sinjoroj Kurita kaj Senga la renkontiĝon ĉeestis ankaŭ tri aliaj membroj de la japana delegitaro, neesperantistoj, inter kiuj la verkisto s-ro Saotome Kacumito, aŭtoro de la libro „Danjo en Vjetnamio", tradukita en E-on. K-do Gorov konigis al la gastoj la agadon de BEA, kaj D. Ĥaĝiev, prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato, rakontis pri ties agado. Ambaŭflanke estis prezentitaj memordonacoj.

La vizito de multnombra japana delegitaro en Bulgario kaj poste en Pollando kaj GDR kaj la aranĝo de la ekspozicio en Sofio kaj Berlino estas pruvo pri la firma volo de la japana popolo kontribui al la batalo por defendo de la paco. Ni dankas pro tiu ĉi vizito kaj pro la aranĝo de la ekspozicio kaj elkore deziras al la japanaj pacamikoj pluan sukceson en ilia vivgrava batalo por defendo de la paco. Samtempe ni volas certigi ilin, ke la bulgara popolo kuraĝe batalas kaj daŭre batalos kontraŭ la milito, por malpermeso de la nukleaj armiloj, por ĝenerala kaj plena malarmado, por ke neniam kaj nenie en la mondo ripetiĝu la tragedio de Hiroŝimo kaj Nagasako, por ke ĉiu homo sur la tero havu garantiita la raiton vivi en paco kaj sekureco.

**D. Haĝiev**

## FLORAS LA AMIKECO INTER *LA* BULGARAJ KAJ HUNGARAJ ESPERANTISTOJ

Ĉi-somere grupo da e-istoj el u. Ŝumen partoprenis la ĉiujaran dusemajnan internacian tendaron de e-istoj naturamikoj en Abaliget, Hungario. Inter amikoj el 10 landoj la senditoj de Ŝumen bone prezentis nian landon. Ili aktive partoprenis la lekciojn pri protekto de la naturo kaj la konkuradojn de naĝado kaj turisma orientiĝo, vizitis la mezepokan fortikaĵon en la pitoreska urbeto Ŝikloŝ. Aparte emocia por ili estis la vizito de la bulgara milittombejo en Harkanj. Kiam la dommastroj eksciis, ke en la grupo de la bulgaroj estas ankaŭ Dimitro Sâbev — soldato el la liberiga Unua Bulgara Armeo, kiu batalis en Hungario kontraŭ la germanaj faŝistoj en 1945 j., ili invitis lin rakonti rememorojn kaj meti florbukedon antaŭ la monumenton en tiu tombejo. La e-istoj kliniĝis antaŭ la heroaĵo de la bulgaraj soldatoj kaj silente promesis batali por paco kaj amikeco en Eŭropo kaj la tuta mondo.

*

Kara gastino de la e-istoj en Ŝumen estis k-dino Gizela Varga, aktivulino de la E-societo en la hungara urbo Pécs (Pejĉ).

Kiel junulino ŝi estis inter la miloj da suferantaj pro la faŝismo hungaroj, kiuj kun floroj renkontis la soldatojn de la Unua Bulgara Armeo, zorgis pri la vunditoj. Dum la lastaj jaroj ŝi ofte vizitis la bulgaran milittombejon en Harkanj, eltrovis nomojn de enterigitoj, fotis la memorplatojn. Tiamaniere ŝi helpis al multaj bulgaraj familioj eksciі, kie kuŝas la ostoj de ties membro — patro, filo, frato. Ravita de la beleco de nia lando kaj la bulgara gastamo, Gizela Varga jam kvaran fojon vizitis Bulgarion.

En kunveno ŝi konigis al niaj e-stoj la interesan historion, rimarkindaĵojn kaj novan vivon de urbo Pecs kaj Hungario. S-anino Varga esprimis sian admiron pri urbo Ŝumen, kiun ŝi vizitis antaŭ 8 jaroj kaj nun trovas ĝin tre ŝanĝita, pli bela kaj bonkonstruita. Aparte emociis ŝin, kiel ankaŭ ĉiun hungaran koron, la fakto, ke ĉiam la loĝantaro de Ŝumen profunde estimas la memoron pri la fama hungara revoluciulo Lajoŝ Koŝut kaj liaj kamaradoj, kiuj en la pasinta jarcento trovis ĉi tie azilon, forpelitaj de la aŭstra tiraneco. S-anino Varga substrekis, ke la historia sorto de niaj du popoloj estas komuna, ni estas fratoj laŭ sango kaj ideoj kaj sankte ni devas gardi kaj firmigi la bulgaran-hungaran amikecon.

**Cvjatko Todorov**

*

Ankaŭ 9-persona grupo de e-istoj el u. Polski Trâmbeŝ partoprenis la internacian tendaron en Abaliget (Meĉek-montaro), kie estis e-istoj el Anglio, Bulgario, Pollando, GDR, Finnlando, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, GFR. Amuzaj vesperoj, ekskursoj al Pejĉ, Mohaĉ, Ŝikloŝ, Harkanj, konkuradoj, diskutoj pri aktualaj problemoj de la mondo, kvizo „Kion vi scias pri Hungario" (plej multe da poentoj inter la individuaj parto-

prenantoj gajnis e-istino el P. Trambeŝ) ka. Apartan signifon havis la vizito en Budapeŝto, akcepto en uzino „Landler" kun partopreno de partiaj, sindikataj kaj e-istaj agantoj, kunveno en la centra E-klubejo, konatiĝo kun la rimarkindaĵoj de la belega urbo.

**Marija Manolova**

E-societo „Roza Valo" en Kazanlâk, kiu ĉi-jare estas societo-jubileulo, honorita per la plej alta kulturordeno en nia lando — „Kiril i Metodij"— I grado, disvolvas aktivan internacian agadon.

La e-istoj de Kazanlâk korespondas tutmonde. Dank'al viglaj internaciaj kontaktoj ĉi-jare en la urbo gastis diverslandaj e-istoj: fraŭlino Fukiko Maŝimo — gimnazia instruistino en u. Nakara, Japanio, Gojko Ranĉiĉ — instruisto el Pirot, Jugoslavio, 7-membra grupo, precipe junuloj, el u. Mezötur, Hungario, ka.

Aparte riĉa estis la 8-taga restado de la junaj hungaroj. Ili konatiĝis kun la vidindaĵoj de Kazanlâk, vizitis la etnografian muzeon kaj la templon-monumenton en v. Ŝipka, la majestan monumenton de la libereco kaj la bulgara-rusa amikeco sur montopinto „Stoletov", la nacian parkon-muzeon „Buzluĝa" ka. Aparte ekinteresis ilin la etnografia muzeo „Etâra" apud Gabrovo, ankaŭ u. Plovdiv.

En Kazanlâk la gastoj renkontiĝis kun la lokaj e-istoj kaj dividis kun ili spertojn el la E-agado. Ilin akceptis la sekretario de la Urba Komitato de Komsomolo k-do Petro Pâdarski kaj la prezidantino de UK de Patrolanda Fronto k-dino Mara Boneva. Ĉi lastan akcepton partoprenis ankaŭ membroj de la estraro de Patrolanda Fronto kaj kolonelo Stojĉo Krondev — prezidanto de la klubo de hungara-bulgara amikeco.

**Jordan Georgiev**

Surbaze de la kontrakto, subskribita inter la E-organizaĵoj en la interfratiĝintaj distriktoj Eger (Hungario) kaj Târgovište (Bulgario), grupo da e-istoj el distrikto Târgovište vizitis la fratan landon Hungario kaj urbon Eger. Pri tio ĉi la distrikta ĵurnalo „Zname na Komunizma" aperigis artikolon, kiun ni donas ĉi-sube iom mallongigita.

Je la 19—22a de julio 18 e-istoj el Târgovište kaj Popovo gastis ĉe siaj samideanoj en u. Eger, Hungario. Tie sub la varma hungara suno ni havis emociajn renkontiĝojn kun amikoj, kiuj volis montri al ni ĉion rimarkindan kaj ĉarman en sia amata urbo. Ni kune estis en la fortikaĵo, en la impona baziliko, en la subrokaj vinkeloj. Ĉie ni sentadis la raran gastamon de egeranoj. Varme kaj kortuŝe pasis la interkona vespero. Ĝi okazis en ejo de la supera pedagogia instituto. Ĉeestis multe da e-istoj-studentoj, laboruloj, oficistoj. Pri la rolo de la internacia lingvo E-o en la porpaca batalo, por interkonatiĝo kaj amikiĝo de la popoloj, pri la amikaj kontaktoj, kiuj estiĝas inter niaj du distriktoj parolis Ŝalga Atila - profesoro en la supera pedagogia instituto. Ankaŭ ni, la bulgaraj gastoj, rakontis pri nia distrikto, pri la sukcesoj de la socialisma konstruado en ĝi kaj pri la vigla labora supreniro antaŭ la bulgara nacia festo — la 9a de septembro.

Neforgesebla restos la vizito en la unuigita infana institucio ĉe la fabriko produktanta fridujojn kaj pneŭmatikajn elementojn. Ankaŭ ĉi tie estis multe da ĝojo, multe da emocioj. Kelkajn horojn ni tuŝiĝis kun la feliĉa infaneco de la hungaraj infanoj. Ekestis nova amikeco inter la kolektivoj de tiu infana ĝardeno en Eger kaj la unua tuttaga infana ĝardeno „Nadeĵda Krupskaja" en Târgovište. „Ni kredas, ke ĉi tiu amika kontakto, efektivigita en la Internacia Jaro de la Infano, estos forta kaj daŭra ero el la granda hungara-bulgara amikeco" — diris la direktorino de la infana institucio.

Multe da konatiĝoj kun novaj homoj, multe da emociaj momentoj — tion ni forportis en la koroj al Bulgario. Kune kun ni veturis ankaŭ magneta bendo kun la voĉetoj de infanetoj de Eger, kiuj salutis siajn amiketojn en Târgovište.

**Dimitrinka Koseva**

## *NACIA MEZLERNEJANA ESPERANTO-BRIGADO*

Sur la historia loko „Kabile" apud u. Jambol, sudorienta Bulgario, de 3 ĝis 29 de aŭgusto la estraro de Bulgara Esperantista Junularo kaj la Distrikta-Urba Estraro de BEA — Jambol, kun la helpo de la Distrikta Historia Muzeo, DK de Komsomolo kaj aliaj institutoj, organizis nacian mezlernejanan brigadon. Brigadestro estis Veselin Penĝekov, studento. En la brigado partoprenis gejunuloj el diversaj urboj: Vidin, Jambol, Pleven, Loveĉ, Dospat, V. Târnovo, Petriĉ, Blagoevgrad, Kazanlâk, Ŝipka, Elhovo, Topolovgrad, Boljarovo, Stralĝa ka.

Post la labortagoj en la brigado oni organizis diversajn belartajn programojn, E-kurson ka. Aparte notinda estis la renkontiĝo de la junaj brigadanoj kun esperantistoj-veteranoj, kiu okazis en la klubo de kulturagantoj. Interesajn rememorojn rakontis la E-veteranoj Ĉonju Panĉev kaj Kutju Zlatarov.

**Dimo Trudoljubov**

# TRA LA E★ MONDO

## LA 64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Pri la 64a Universala Kongreso de E-o en Lucerno oni povas tuj diri: ĉio pasis normale. Precipe grava estas la kontribuo de tiu kongreso en la organiza vivo de UEA. Finfine estis aprobita de la Komitato de UEA la nova Statuto, laŭ kiu (post definitiva aprobo fare de ĝenerala voĉdono) UEA gvidos sin en la estonteco, kompreneble post ties leĝigo de la nederlandaj aŭtoritatoj.

UEA akceptis du novajn landajn asociojn — de Portugalio kaj Ĉilio, per kio la aliĝintaj landaj asocioj jam atingis 42. Novaj asocioj sin pretigas kandidatiĝi. Evidente, UEA daŭre fariĝas la sola plej aŭtoritata internacia E-organizaĵo, kiu povas respondece reprezenti la mondan esperantistaron antaŭ ĉiuj internaciaj kaj interŝtataj instancoj. Ja ekzistas gravaj problemoj de la E-movado, kiujn povas digne prezenti nur aŭtoritata monda E-centro.

La kongreso estis honorita per la ĉeesto de reprezentantoj de diversaj ŝtatoj. Notinda estas la fakto, ke kvar ambasadoroj (Pollando, Kubo, Bulgario, Ĉinio) persone salutis la kongreson. Krome, ĉi-jare notindaĵo estas ankaŭ la simpatia alparolo de la sekretario de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK) de UN s-ro Robert Muller kaj la skribaj salutoj de UNESKO, UN-Oficejo en Ĝenevo, Universala Poŝta Unio, Monda Organizaĵo pri Sano, Organizo de Afrika Unueco, Organizo de Amerikaj Ŝtatoj ka. Ĉio ĉi plivastigis la spektron de aŭtoritataj internaciaj kaj interŝtataj organizoj, esprimantaj oficialan starpunkton pozitive al la streboj de la esperantistaro.

Simpatia estis ankaŭ la gesto de d-ro Walter Gut — oficiala reprezentanto de la svisa federacia prezidanto, traleginta en perfekta E-o oficialan mesaĝon. Tiu gesto estis alte aprezita de la tuta kongresanaro per tondraj aplaŭdoj.

La kutima akcepto de ĉ. 200 kongresanoj en la antikva urbodomo de Lucerno kaj la salutvortoj de la ĉefurbestro ankaŭ estis bela elemento en la panoramo de la 64a UK.

La sincera parolado de la UEA-prezidanto d-ro Tonkin ĉe la inaŭguro de la kongreso estis trafa. Li ne preterlasis rememorigi, ke la esperantistaro ne venas al tiu ĉi kongreso kiel en kutiman kongreslandon, ĉar ĝi sentas sin kvazaŭ en sia propra hejmo pro la fakto, ke nome en tiu lando en 1908 j. estis fondita en Ĝenevo la Universala E-Asocio. Kaj li danke citis la nomon de Hektor Hodler, kiu utiligis sian brilan organizan talenton, grandan energion kaj proprajn monrimedojn por akuŝi la naskiĝon de tiu plej reprezenta E-organizaĵo.

La organizantoj de la kongreso en la personeco de la membroj de LKK plenumis brile siajn nefacilajn taskojn. Trankvile, senbrue, aferece ili metis sin je dispono al la kongresanoj kaj kontentigis multajn dezirojn eĉ ekster la rutinaj devoj de LKK-anoj. La bone organizita svisa hotela priservado ankoraŭfoje montris sian altan nivelon. KKS, jam kun pli riĉa sperto, sukcesis esti digna organizanto de la interna ordo de la multnombraj kongresaj programeroj kaj de la sennombraj kaj neantaŭvide-

*La 64a UK de Esperanto: salutas la plej junaj e-istoj el la Infana Kongreseto*



blaj formalaj kaj neformalaj kunsidoj de la Komitato kaj de la Estraro de UEA.

La etoso de la tuta kongreso estis ĝenerale amika kaj kunlabora. Mankis sencela vagado. Regis bona ordo en ĉiuj kongresaranĝoj.

Por la bona humoro de la kongresanoj multe kontribuis ankaŭ la natura beleco kaj hejmeco de la kongresurbo. Estis vera plezuro la rondveturado tra Lucerno. La impreso estas kvazaŭ vi promenadas en ĝardenurbo. La unikaj kaj tre interesaj muzeoj — la Transporta kaj la Glacia Ĝardeno — vere vizitindas. Superflue estas paroli pri la allogaj alpaj pejzaĝoj dum la unutagaj ekskursoj. Veturado sur la Kvarkantona Lago apud Lucerno — unu el la plej grandaj naturaj lagoj de Svislando — donas neforgeseblajn travivaĵojn.

Mi persone estus deziranta pluan pliperfektiĝon de la laboro dum la Komitatkunsidoj. Ekzistas ankoraŭ superflua fendado de haroj.

En simila altranga gvidorgano, kia estas la Komitato de UEA, la diskutoj devas esti pli principaj. La stilan polurigon de la dokumentoj oni devas lasi al redaktaj komisionoj de spertaj personoj el la medio de la komitatanoj. Simila maniero de laboro donos realan eblecon al la komitatanoj kaj estraranoj de UEA ĉeesti ĉiujn pli gravajn programerojn de la kongreso, havi propran imagon pri la farata multfaceta laboro, persone partopreni en la diskutado de gravaj problemoj kaj kunhelpi la ellaboron de principaj starpozicioj. Estas laŭ mi nepre necesa fari la pritrakton de la projektoj de rezolucioj ne en la lasta kunsido de la Komitato, ĉar tiam la labortempo estas treege limigita kaj streĉa. Ĝenerale, ekzistas diversaj eblecoj por simpligo de la nuna proceduro kaj por altigo de la nivelo de la tuta Komitat-laboro.

La svisa gazetaro donis kontentigan lokon al informoj aŭ aliaj ĵurnalistaj materialoj lige kun la kongreso. Tamen la Gazetara Servo devis nepre eldoni ankaŭ esperantlingvan bultenon pri la kongresa funkciado: la unusolaj germanlingvaj informoj estis utilaj nur por la svisaj gazetoj kaj germane parolantaj e-istoj, la plimulto de la E-redakcioj ne povis utiligi ilin. Estas gratulinda la regula aperigado kaj bona redaktado de „Kuriero".

Kun plezuro mi citas la fakton, ke la internacie konataj aktivuloj de la E-movado s-rino Emilija Lapenna (Zagrebo) kaj prof. d-ro Hideo Ŝinoda (Japanio) estis unuanime elektitaj kiel honoraj membroj de UEA.

Mi notos ankoraŭ du sublimajn momentojn: la tre viglan aperon de la infanojesperantistoj antaŭ la kongresanoj kaj la transdonon de „pupoj de la paco" fare de japanaj neesperantistaj organizaĵoj, simbolantaj tiamaniere la pacstrebojn de la multsuferinta japana popolo pro la atombombado de Hiroŝimo kaj Nagasako. Al la pac-etoso de la kongreso kontribuis ankaŭ la bone vizitita kunveno de Mondpaca E-Movado.

Fine mi dezirus aparte mencii la partoprenon de bulgaraj gee-istoj en la laboro de la kongreso. Plej gravan lokon en la kultura programo okupis la teatra prezento de la dramverko „Amo" fare de la kvaropo Belka Beleva, Anani Anev, Veselin Damjanov, Prodan Prodanov, kiu en du spektakloj kaptis la atenton de la publiko per la psikologia arta analizo de tiu komplika homa fenomeno — la amo. La reĝisorino Stefka Proĥaskova diligente plenumis sian taskon.

La konata baritono Veselin Damjanov donis apartan recitalon, varme aplaŭdatan de la publiko. Tre simpatie sin prezentis (duan fojon post Varno) la juna operetkantistino el Jambol Galja Kostova. Same bonan akcepton trovis ĉe la publiko la unuafoje aperinta en estrada koncerto Prodan Prodanov, artisto-ĥorusano de la Ŝtata Muzikteatro de Sofio. Li estis ankaŭ aŭtoro de ekspoziciitaj grafikaj bildoj en la kongresa akceptejo. Brila estis la laŭtema ekspozicio de Zdravko Nikolov (Veliko Târnovo) el la vivo de la infanoj, dediĉita al la Internacia Jaro de la Infano. Li donacis ĝin al UEA por plua prezento. En la Belartaj Konkursoj estis premiitaj du bulgaraj aŭtorinoj de originalaj verkoj — Rajna Konstantinova kaj Nevena Nedelĉeva, ambaŭ el Sofio.

En specialigitaj fakkunsidoj gvidis Violin Oljanov (filologoj), Draguŝko Petrov (IPTEA) ka. Fakprelegon pri medicina temo faris la juna doktorino Mariana G. Dimova el Varno. Interesan kontribuon al la traktado de la ĉefa kongresa temo „La lingva aspekto de la internacia organiziĝo" faris la speciale invitita de UEA bulgara e-isto Simeon Delĉev Simeonov — alta funkciulo en internacia faka organizaĵo en Ĝenevo. La bulgaraj komitatanoj de UEA aktive partoprenis la komitatkunsidojn. Estis prezentita ankaŭ speciala filmo pri la 63 UK en Varno, farita de bulgaraj esperantistojkinoamatoroj el Gabrovo.

La kongreson partoprenis la membro de la Honora Komitato de UEA prof. Vasil Peevski, kiu dume estis elektita prezidanto de la Internacia Federacio de Geodezistoj — tre grava scienca posteno en neesperantista faka organizaĵo.

Koncize: la 64a plenumis bone sian rolon de Monda E-forumo kaj kreis bonajn perspektivojn por la sekvonta 65a UK en Stokholmo.

**Nikola Aleksiev**
komitatano de UEA

## KONGRESA REZOLUCIO

La 64a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lucerno, Svislando, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto, 1979, kun 1635 partoprenantoj el 49 landoj, kaj studinte la temon „Lingvaj aspektoj de internacia organiziĝo“, konstatas:

1. En nia epoko la kontaktoj inter la nacioj, okazantaj jam de la plej fruaj historiaj epokoj, draste plimultiĝas, parte pro la rapida evoluo de la komunika teknologio, parte pro la kreskanta interplektiĝo de la interesoj de la nacioj en sociaj, ekonomiaj, kulturaj, juraj kaj aliaj terenoj.

2. La lingvaj samecoj kaj diferencoj ludas tre signifan rolon en la formiĝo de internaciaj kontaktoj kaj de la organizaj strukturoj, kiuj kreiĝas por ebligi tiujn kontaktojn.

3. La kontaktoj emas sekvi la liniojn de internacia disvastiĝo de unuopaj lingvoj; tiu disvastiĝo siavice estas rezulto de historiaj, ekonomiaj kaj politikaj evoluoj, kaj en multaj kazoj ĝi estas postlasaĵo de la kolonia epoko.

4. La lingvaj diferencoj siavice grave malhelpas la kreadon de horizontalaj strukturoj por transporti la menciitajn interesoliniojn.

5. Interalie, tiaj diferencoj ĝenas la agadon de ĉiuj ĉefaj interregistaraj organizoj tutmondaj kaj regionaj; la lingvaj servoj de la menciitaj organizoj foruzas grandan parton de iliaj buĝetoj, kaj la lingvaj reguloj, aplikataj en la organizoj, kaŭzas gravajn diskriminaciojn kaj maljustaĵojn.

6. Ankaŭ en aliaj formoj de internacia organiziĝo, ekzemple en multnaciaj entreprenoj kaj sciencaj organizoj, aplikiĝas lingvaj praktikoj severe diskriminaciaj, kiuj favoras iujn lingvojn kaj malfavoras aliajn, tiel donante signifajn avantaĝojn al iuj landoj kaj ne al aliaj, kaj minacante kulturajn pluralismon kaj egalecon.

7. En internaciaj organizoj oni ĝis nun ne trovis adekvatan solvon al la problemo de lingva diverseco, precipe ĉar la lingva praktiko de tiuj organizoj estas bazita sur la supozo, ke ekzistas komune akceptebla ekvilibro inter lingva egaleco (la traktado de ĉiuj lingvoj kiel egalaj) unuflanke, kaj lingva unueco (la utiligo de unusola etna lingvo) aliflanke; tiu supozo estas fundamente erara kaj kondukas al politikaj rivalecoj, diskriminacio kaj superfluaj elspezoj.

8. Kelkaj organizoj, interalie Universala Esperanto-Asocio, aplikas alian solvon — la utiligon de la Internacia Lingvo Esperanto; tiu solvo samtempe ebligas egalecon (ĉiuj partoprenantoj en la laboro uzas duan lingvon, kiun ili devas lerni, sed kiu estas relative facile akirebla de ĉiuj homoj), kaj unuecon (ili uzas nur unu lingvon).

9. Post preskaŭ cent jaroj de utiligo en plej diversaj cirkonstancoj kaj medioj Esperanto plene konfirmis siajn pretendojn al serioza atento kiel funkcianta solvo de la problemo de lingvo en internacia organiziĝo; ĝi estas hodiaŭ uzata de centmiloj da homoj tra la tuta mondo kaj grave kontribuas al internacia kompreniĝo.

10. Malgraŭ la signifoplenaj atingoj de Esperanto, ĝi nuntempe ne ricevas sufiĉan seriozan atenton de la grandaj interregistaraj organizoj kaj en aliaj internaciaj organizaj strukturoj; male, al tiuj diversaj organizoj nuntempe mankas adekvataj respondoj al lingvaj problemoj, respondoj samtempe justaj kaj praktikaj.

11. Universala Esperanto-Asocio notas kun konsiderinda maltrankvilo, ke la grandaj internaciaj organizoj hezitas doni al Esperanto seriozan atenton, ĉar ili ŝajne timas, ke tia atento estos interpretata kiel rekta subteno; sed ĝi atentigas, ke ne eblas fari seriozan sciencan kaj racian decidon pri fenomeno, kiun oni ne studis objektive kaj detale; ĝi plue atentigas, ke la menciitaj organizoj ne sukcesis trovi pli bonan aŭ eĉ egale bonan solvon al la lingva problemo ĝis nun, kaj ne donas esperon, ke ili tion atingos en la estonteco.

12. Sekve, Universala Esperanto-Asocio forte alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO kaj aliaj internaciaj organizoj, tutmondaj kaj regionaj, dediĉi seriozan atenton al la lingva demando kaj al la solvo, kiun prezentas Esperanto.

## PUBLIKA MEM-KUNVENO EN LUCERNO

La 30an de julio en la salono „Forel“ okazis dumkongresa publika MEM-kunveno. La salono havis ĉ. 50 seĝojn, sed la intereso de la publiko estis granda, kaj oni alportis aldonajn seĝojn, tiel ke la nombro de la ĉeestantoj atingis ĉ. 80 personojn el almenaŭ 11 landoj. Multaj MEM-anoj anticipe informis, ke pro samtempa okupateco en aliaj fakkunvenoj ne povos ĉeesti la kunvenon de MEM, kaj petis pardonon.

Raporton pri la agado de MEM post la Oka Ĝenerala Konferenco en Varno (1978) faris la prezidanto de MEM pacamiko Imre Pethes. En la diskutado partoprenis ok personoj. Fine oni aprobis koncizan deklaron.

Pripacan poemon recitis s-anino Vera Văĵarova el Sofio, varme aplaŭdita de la publiko.

**Ĉeestinto**

## DEKLARO

*de la publika MEM-kunveno en Lucerno (30. 7. 1979)*

Post la raporto de parolaniko Imre Pethes kaj la okazintaj diskutoj, la kunvenintoj deklaris:

1. APROBAS la raporton de la prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) Imre Pethes.
2. APELACIAS al la tutmonda esperantistaro subteni la agadon de MEM.
3. SOLIDARIĜAS kun la oficiala dokumento de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UNO), iniciatita de Pola Popola Respubliko, sub titolo „Pri edukado de la socioj en spirito de Paco" (eldonita en E-o de Pola E-Asocio).

*Por la kunvenintoj*
*Nikola Aleksiev*

## II INTERNACIA MEDICINA E-KONFERENCO

En la bela hungara urbo Hodmezővasarhely je la 8—14 de julio okazis la Dua IMEK. Ĝin partoprenis 128 e-istoj-medicinistoj, inter kiuj 25 gebulgaroj.

La konferenco estis solene inaŭgurita per „La espero". Malfermajn vortojn diris d-ro Imre Ferenc — la sekretario de Universala Medicina E-Asocio (UMEA).

Salutojn prezentis la unua sekretario de la Urba Komitato de la Hungara Laborista Socialista Partio. Aparte kortuŝa estis la saluto de la malgrandaj denaskaj e-istoj. Sekvis salutoj de reprezentantoj de diversaj landoj. El Bulgario salutis Sijka Kravaeva, apotekistino el Sofio. Ŝi ankaŭ rakontis pri la novefondita en Sofio E-societo de medicinistoj „D-ro L. L. Zamenhof".

Reprezentantojn de ĉiuj landoj, partoprenantaj en la konferenco, akceptis posttagmeze la urbestro. En sia parolado li diris tre bonajn vortojn pri E-o kaj rakontis pri la historio kaj la nuntempeco de la urbo. Al ĉiu ĉeestanto la urbestro enmanigis memordonacojn kun simbolo de la urbo kaj medalo „25 jaroj de la Urba Soveto".

Dum la konferenco estis faritaj 45 sciencaj prelegoj pri medicinaj temoj.

Enkadre de la konferenco okazis renkontiĝo de familioj, en kiuj estas infanoj denaske parolantaj E-on.

La konferencanoj veturis al u. Gjula, kie ili aŭskultis 2 prelegojn en la Somera Universitato.

Dum la solena fermo de la konferenco d-ro Ferenc ornamis la prelegintojn per medaloj.

**Sijka Kravaeva**

## Letero de amikeco

*Al la redakcio de „Bulgara Esperantisto"*

Estimataj kamaradoj kaj samideanoj!

Mi estas konstanta leganto de via gazeto, kiun mi regule ricevas pro ĝentileco de unu el miaj geamikoj en via lando. Mi estas kunfondinto kaj membro de la estraro de ADAMIHS (Asocio de Amikeco Hispana-Soveta) en mia loĝregiono. Nu, la ĉefaj celoj de ĉi tiu asocio estas diskonigo de la vero pri Sovetunio, kiu dum la faŝisma mallumo de preskaŭ 40 jaroj estis misprezentata al la hispana popolo; kulturaj interŝanĝoj de la popoloj sovetaj kaj hispanaj; reciprokaj vizitoj ktp. Sed, krom ĉi tio, ADAMIHS ankaŭ celas diskonigon de la vero pri ĉiuj landoj de la socialisma tendaro, kiuj estas tiom malmulte konataj al la hispana popolo pro la sama supre citita kaŭzo.

Nu, en la kadro de niaj celoj en junio ni organizis Monaton de Popola Respubliko Bulgario. Tion ni faris kunlabore kun la ambasado de via lando en Madrido, kiu disponigis al ni broŝurojn, revuojn, gazetojn, filmojn, ekspoziciaĵojn (grandajn fotografaĵojn), librojn k. s. Dum la tuta monato en la salonego de nia asocio oni povis admiri la ekspozicion pri la 1300-jara historio de Bulgario, pri ties arto, monumentoj ktp., samkiel kontiĝi kun la nuna bulgara junularo. La ekspozicion vizitis multe da personoj, al kiuj ĝi faris grandan impreson. Ili gratulis la estraron de ADAMIHS pro tiu aranĝo. La 5-an de junio vizitis nian sidejon s-ro Ivan Ĥristov, kultura ataŝeo de via ambasado, kun sia edzino, kaj s-ro Ivan Kânĉev, profesoro en la Sofia Universitato kaj provizora profesoro pri bulgara lingvo en la Madrida Universitato. Ambaŭ s-roj salutis la ĉeestantaron en speciala kunveno, kiun ni aranĝis tiucele. S-ro Kânĉev prelegis en hispana lingvo, artoratore, pri la historio de Bulgario kaj pri la bulgara junularo en nuna Bulgario, kie oni konstruas socialismon. La prelegon ĉeestis multaj personoj. La loka gazetaro favore raportis pri ĝi kaj publikigis intervjuon kun s-roj Ĥristov kaj Kânĉev. Nia asocio kunlabore kun la universitato projekciis bulgarajn filmojn en

☆

HEROA PASINTECO

## LA BRUNULO

*Ĥrima*

Mi bone memoras lin, kvankam de tiam pasis pli ol kvar jardekoj. Li vivas en mia memoro en uniformo de gimnaziano, kun densa hararo kaj ĝermantaj lipharoj. El sub densaj brovoj rigardis paro da esploremaj okuloj. Pro lia bruna kiel kaŝtano vizaĝo oni nomis lin „la Brunulo". Ĉe la bapto la Brunulo estis ricevinta la nomon Vladimir. Li naskiĝis la 14an de novembro 1914 jaron en la ĉedanuba urbo Vidin, en la familio de veterinara helpkuracisto Dimo Gerĝikov. Oficaj devoj translokis la familion en la sudbulgaran urbon Stara Zagora.

Vladimir bone sukcesis en la lernado. Jam juna gimnaziano li komencis lerni E-on kaj baldaŭ ekposedis ĝin. Li interŝanĝis leterojn kaj bildkartojn kun e-istoj el diversaj landoj. En siaj leteroj liaj korespondantoj el Sovetio rakontis pri la unua kvinjara plano — pri la konstruado de la digo ĉe Dnepro, pri la traktora uzino ĉe Volgo, pri uzino por metalproduktado en Uralo ka. La kontaktoj kun sovetaj homoj atingis la orelojn de la direktoro kaj oni eksigis la junulon el la gimnazio.

Dezirante nepre daŭrigi la lernadon, Vladimir veturis de urbo al urbo, petante, ke oni akceptu lin en iu mezlernejo. Fine li havis bonŝancon en urbo Asenovgrad. La tiea gimnazio estis nomata „La ruĝa gimnazio", ĉar la demokratia direktoro protektis junajn homojn, kiuj interesiĝis pri sociaj aferoj.

En Asenovgrad tiutempe aktivis la E-societo „Signo de l'Espero" kaj la loka filio de la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). Vladimir aliĝis al la lasta, konsistanta ĉefe el laboristoj. Certiĝinte, ke li estas fidinda kamarado, la estraro de la filio inicis lin en niaj aferoj. Vladimir tuj montris pretecon kunlabori en la eldonado de „Proleta E-Korespondanto" (PEK-bulteno), kiun ni redaktis laŭ komisio de CK de BuLEA. Per tiu bulteno ni informis la fremdlandajn e-istojn pri la klasbatalo en nia lando. Siajn artikolojn Vladimir subskribis per la pseŭdonimo „Brunulo".

Samtempe Vladimir aktivis en la gimnazio. Li fondis rondon, en kiu li klarigis la leĝojn de la klasbatalo, rakontis pri siaj amikoj en Sovetio, buŝe tradukis el E-o en la bulgaran la verkon „Ŝtato kaj revolucio" de Lenin, la dramon „Disrompo" de Boris Lavrenev, versaĵojn de Vladimir Majakovskij ktp. Dank'al sia kulturkleriga aktiveco li ĝuis grandan aŭtoritaton, kaj oni elektis lin gvidanto de la marksisma organizaĵo en la gimnazio. Samtempe li estis kooptita al la Distrikta Komitato de la La-

---

*(El. p 14)*

salono de la teatro de tiu universitato. La filmoj, samkiel la ceteraj aranĝoj de la Monato, havis grandan sukceson kaj por la publiko, kaj por la radio-gazetara informado. Do, niaopinie, ni sukcesis pri nia celo. Ekde junio la asturia popolo estas jam iomete pli bone informita pri Popola Respubliko Bulgario, pri tiu ĝis antaŭ ne multe „ekzotika" lando, kie oni nuntempe disvolvas socialisman socion, kie oni konsekvence batalas por paco.

Mi kunsendas eltondaĵon pri tiu Monato de PR Bulgario el la ĉefa loka ĵurnalo.

Mi informas vin ankaŭ pri tio, ke la Alvokon, kiun vi publikigis en n-ro 2/79 pri la Internacia Infanasembleo „Standardo de la Paco", ni publikigis en nia modesta bulteno „Heleco", eldonata de nia loka E-grupo.

Mi profitas la okazon por vin gratuli pro via interesplena gazeto, kiun mi ĉiam avide tralegas.

Bonvolu akcepti miajn plej korajn kaj kamaradece pacajn salutojn.

**Adonis Gonzalez Meana,**
*u. Gijon, Asturias*

borista Junulara Unuiĝo (RMS).

Fininte la gimnazion en 1933 jaro, Vladimir revenis al Stara Zagora kaj fariĝis profesia revoluciulo, gvidanto de la laborista junularo en la distrikto. Samtempe li plue aktivis en BuLEA.

En majo 1934 j. la reakcia oficira unuiĝo per puĉo renversis la burĝan reĝimon kaj severe malpermesis ĉian progreseman politikan kaj kulturklerigan agadon. BuLEA plue laboris eksterleĝe. La polico ekflaris la gvidan rolon de Brunulo kaj provis aresti lin. Vladimir eskapis kaj ekloĝis sub alia nomo en urbo Plovdiv. Tamen ankaŭ tie oni ekflaris lin, kaj li aliĝis al grupo da kamaradoj, kiuj sin kaŝis en la arbaregoj de Rodopo. En 1935 Vladimir sukcesis trairi la limon kaj forveturis al la Soveta Lando, kie li trovis azilon.

Vivante en eksterlando Vladimine forgesis siajn amikojn en Asenovgrad. De tempo al tempo li sendis bk el Moskvo. Estante volontulo en Hispanio, li sendis al ni gazeton en E-o „Popola Fronto“ kaj broŝuretojn pri la justa batalo de la hispana respubliko.

Reveninte Sovetion, Brunulo daŭrigis sian studadon en la instituto de inĝenierscienco. La surpriza atako de Hitler ne lasis lin indiferenta. Li petis kaj oni akceptis lin volontulo, simile al ĉiuj studentoj el la altlernejo. En decembro 1943 faŝista kuglo frakasis lian vivon sur la fronto.

Inter la herooj, kiuj pereis en la batalo kontraŭ faŝismo, Vladimir Gerĝikov enviciĝis kiel digna kamarado kaj esperantisto.

## Verdaj steletoj

*EL LA INFANASEMBLEO*

### *La homoj vivos kiel amikoj*

Mi loĝas en urbo Kiev, Ukraino. Mi estas 13-jara lernanto en la 7 klaso. Delonge mi pentras kaj mia revo estas fariĝi pentristo. Ĝis nun pro miaj pentraĵoj mi ricevis internaciajn premiojn.

Por mi la estonteco estas tempo, kiam ne ekzistos militoj, la paco regos ĉie en la mondo, la homoj estos amikoj. Tial ĝuste ni, la infanoj, kiuj post jaroj fariĝos plenkreskuloj, ekde nun devas fari ĉion eblan por realigi tiun ĉi revon, por ke la tero floradu sub paca blua ĉielo. La celo de nia alveturo ĉi tien, al la Asembleo en Sofio, estas tio, kion la nuntempaj infanoj povas doni al la estonteco: fariĝi amikoj, ankoraŭ pli bone ekkoni unuj la aliajn.

**Andrej Musienko**

*Kiev, Sovetunio*

### *Karaj bulgaraj infanoj!*

Antaŭ ol direkti mian mesaĝon al vi, mi deziras diri: ni, la etiopaj infanoj, estas senfine feliĉaj, ke ni troviĝas ĉe vi kaj partoprenas en la Internacia Infanasembleo, kiu estas nomita tre ĝuste — „Standardo de la Paco“. Tial mi ankoraŭ foje dankas vin, karaj bulgaraj infanoj, pro tio, ke vi invitis tiom multe da partoprenantoj el la tuta mondo.

Car la Asembleo gloras la pacon kaj la amikecon inter la homoj, nia nuna renkontiĝo estas grava kontribuo al la formiĝo de la nuntempaj infanoj por la morgaŭ socio. Ĝi montras, ke Bulgario strebas garantii pacon en la tuta mondo.

Mi dankas vin je la nomo de la etiopaj infanoj!

Ni konstruos eternan pacon!

**Abebe Hajle,** *u. Ĝima,*
*provinco Kaffa, Etiopi*

## *Ni somerumis apud Druĵevo*

Ni, dudek sep infanoj el u. Kazanlâk, partoprenis en julio la Esperantan tendarlernejon apud v. Druĵevo en la Balkanmontaro. Kursgvidantino estis nia amata k-dino Penka Miĥajlova. Ni ĉiuj estis ravitaj de la belega naturo, trankvileco kaj pura aero. La programo estis varia. Kompreneble, ĉiutage io ripetiĝis, ekzemple gimnastiko, lingvoperfektiga kurso, kaj, nature, matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo.

Ni faris tuttagan piedan ekskurson tra la montaro kaj kelkajn per aŭtobuso — al u. Vârŝec kaj proksimaj vilaĝoj.

Gastis ĉe ni grupo da e-istoj el u. Svoge, al kiuj tre plaĉis nia lingvoscio.

Lernado, ludoj, emociaj travivaĵoj en la bela naturo daŭris de la unua ĝis la lasta tagoj. Ni estas tre kontentaj pro nia partopreno en la kurso en Druĵevo kaj ni elkore rekomendas ĝin al ĉiuj infanoj.

*Je la nomo de la tuta grupo:*
**D. Ĉerneva, D. Orozova, M. Vâlĉeva**

### *JUNPIONIRA FESTIVALO EN VELINGRAD*

En junio pli ol 180 junpioniroj el la tuta lando kolektiĝis en la urbo de Vela — nia senmorta popola heroino kaj arda esperantistino, pereinta en la granda kontraŭfaŝisma batalo. Ili venis kun siaj Esperantaj kantoj kaj versoj, kun siaj dancoj kaj pura entuziasmo, por manifesti siajn atingojn. La festivalo estis dediĉita al la Internacia Jaro de la Infano. Speciala ĵurio pritaksis tiujn atingojn kaj aljuĝis la jenajn premiojn:

#### Individuaj recitantoj

I premio: Bertina Kocanova — Plovdiv
Aleksandro Plaĉkov — v. Trud, distrikto Plovdiv
II premio: Maria Stoilova — Plovdiv
Evelina Mineva — Sofio
Daniela Stojanova — Plovdiv
III premio: Iskra Oljanova — Sofio
Vesela Dimitrova — Plovdiv
Vâlka Petkova — Gâlâbovo
Emilija Pejĉinova — Plovdiv

#### Kolektivaj recitaloj

I premio: Kolektivo „Verdaj Steletoj" — Sofio, gvidantino St. Kalimenova
II premio: Kolektivo de Madan, gvidanto G. Ĥarizanov

#### Muziko

I premio: Kantgrupo „Steleto" — Kjustendil, gvidantino A. Mileva
II premio: ne aljuĝita
III premio: Grupo por Politika Kanto „Juneco" ĉe lernejo „Zaĥari Kruŝa" — Sofio, gvidantino E. Ĥristova.



Floroj por s-ro A. M. M' Bow, ĵus alfluginta por la inaŭguro de la Infanasembleo en Sofio. Dekstre — k-dino Ljudmila Ĵivkova — prezidanto de la Komitato de Kulturo, maldekstre k-do Georgi Jordanov — sekretario de la Urba Komitato de BKP en Sofio.



Karaj gastoj de la Infanasembleo el revolucia Nikaragvo: Markos Sandigo, Roberto Flores kaj Francisko Savala, 12 — 14-jaraj. Ili transdonis al la bulgara junpionira organizaĵo „Septemvrijĉe" la armilojn, per kiuj ili batalis por libero kaj justeco en Nikaragvo.

*Fotoj: Nadja Hlebarova*

## AŬTUNO

Teksto: **Violin Oljanov**

Muziko: **Dimitro Denĉe**




Trankvila estas la arbaro,
bloveto nek, nek movo nun.
Surfingre triste kaj amare
promenas lacigita sun'.

Blankvesto ŝanĝos orkoloron,
kaj ĉesos lasta murmuret',
kaj birdan pepon, florodoron
enkatenigos frosta ret'.

Sed venos ree la printempo,
ekbrilos hele la lazur',
kaj sub la blua firmamento
eksimfonios la natur'.

Nin ofte rodas la angoro,
animon premas nubaŭtun',
sed sekvas tion ĝojhumoro,
ekridas reviviga sun'.

## PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ, NASKITAJ EN OKTOBRO

Fordonu vian liberecon nek por amara, nek por dolĉa panpeco: la aglo pereas, fermita en kaĝo, kvankam oni ĉiutage ĵetas al ĝi bestkadavrojn.

**Popo Bogomil**, socia-religia reformanto el la X jc.

Ju pli aŭtentika estas la vero, des pli aŭdaca ĝi aspektas.

**Dimitro Podvârzaĉev**, verkisto (6. X. 1881 — 15. XII. 1937)

La forto estas sano de la korpo, la boneco — sano de la animo.

La heroon oni ekkonas dum milito, la amikon — ĉe bezono kaj la saĝulon — ĉe kolerego.

La enuo estas malsano konata nur ĉe malagemuloj.

**St. Ĉilingirov**, verkisto (26. X. 1881 — 23. XI. 1962)

*Elektis kaj tradukis:* St. Kostadinov

**ABONO AL „SCIENCA MONDO" ANKORAŬ EBLAS!**

„Scienca Mondo" estas oficiala organo de tre prestiĝa organizaĵo — Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj.

Paralele kun eldonaĵo en angla, franca, germana kaj rusa jam kvar jarojn ĝi aperas ankaŭ en Esperanto. La jara abonkotizo estas bagatela, simbola — nur 1 levo! Neniu E-revuo en la mondo estas tiel malmultekosta.

Samideanoj! Se vi ankoraŭ ne abonis „Sciencan Mondon" por 1979 j., tion vi povas fari ankaŭ nun sendante 1 levon al adreso: DS Kasa Sofijski Gradski Klon, smetka 185 II 5005 na Sajuza na Naučnite Rabotnici. Samtempe sendu klarigan leteron (por kio vi pagas) al adreso: Sajuz na Naučnite Rabotnici v Balgaria, bul. Tolbuĥin 18, 1000 Sofia.

Komenciĝis la abonkampanjo por 1980 j. Abonu la revuon per la poŝto laŭ kataloga n-ro 0733!

Ĝi estas interesa kaj valora donaco por viaj eksterlandaj amikoj. Abonigu ankaŭ ilin!

Neniu esperantisto sen „Scienca Mondo"!

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL